# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

ĵaŭdon, la 5an de Julio, 2017 • numero tri


## Hodiaŭ

- ★ **7:30 atm:** Matenmanĝo
- ★ **8:30 – 12:15 ptm:** Lecionoj (Alexander, Kováts, Löwenstein)
- ★ **12:30 ptm:** Tagmanĝo
- ★ **2:30 – 5:00 ptm:** Lecionoj (Vergara)
- ★ **5:45 ptm:** Vespermanĝo
- ★ **7:00 – 8:00 ptm: Sinĵeno KARP amuzos nin per sia prezento: "Pli Alloga ol David Bowie: komikaĵoj pri simioj, kismarkoj, kaj la postaĵo de David Bowie."** *Flowe 110*

## Vifio (Wi-Fi)

Senpaga vifio estas alirebla ĉie en la universitata tereno. Konektu per:

reto: wpu-conferenceevents
pasvorto: wpuevents

## Tujmesaĝu al ni per *Telegram*

*de la Redaktoro*

Eble la plejmulto de la NASKanoj jam estas membroj de la *Facebook*-grupo "NASK 2018". Sed ekzistas ankaŭ grupo en la servo *Telegram*, kiun oni povas uzi per poŝtelefonoj. Uzante *Telegram*-on, oni povas tuje mesaĝi al la tuta grupo. Por aliĝi al la NASKa grupo, unue instalu la programon en via poŝtelefono kaj poste vizitu la jenan ligilon per la poŝtelefona retumilo:

https://goo.gl/NKdkYs

## Angulo de la verkemulo

*de Jorge Rafael NOGUERAS*

Ĉu vi ŝatus verki ion por la Fasko, sed vi ne scias kion? Mi helpu vin! Mi proponos al vi la lastan linion de rakonto, kaj vi simple devos skribi tion, kio okazis antaŭe! Via rakonto povas esti longa nur unu aŭ du frazojn, tutan alineon, aŭ eĉ pli, laŭplaĉe.

Jen eblaj lastaj linioj por veki vian imagpovon:

- Tamen, li vidis, ke la spegulo montris nenian reflekton...
- La koboldo rigardis lin rekte en la okulojn kaj graŭlis minace: "Ne, ĉar hodiaŭ estos via lasta tago".
- La knabino paŝis super la kadavron de la sorĉistino kaj diris: "Mi ja avertis vin, ke oni ne provu tuŝi min".

Mi antaŭĝojas legi la rakontojn, kiujn ni verkos kune dum NASK!

## Nia distra vespero bezonas vin! Our variety show needs you!


*de Alena ADLER kaj Simmon (Simono) BARNEY (English version follows)*

Espereble vi ekscitiĝas pri nia distra vespero! Tiu programo okazos en mardo vespere kaj ĉiam provizas multan ĝuon kaj amuziĝon al la tuta grupo, kaj spektantoj kaj prezentantoj. Do ni kompreneble dependas de la bonvola volontulado de homoj kun la kuraĝo prezenti ion sur la scenejo por feliĉigi ĉiujn. Se vi havas muzikan talenton, deklamemon, lerton danci, aŭ ian sekretan talenton kiu povus distre prezentiĝi sur la scenejo, skribu retmesaĝon al <adreso forviŝita>

Ni estas tiom granda grupo ĉi jare, ke kunmeti ĉiujn talentojn en unu prezenton estos interesa defio por viaj organizantoj. La distra vespero ne estu tiom longa, ke oni emu ekdormi antaŭ la fino. Kaj ideale, ĝi estu laŭeble diversa kaj bunta. Tio signifas, ke ni ne povas garantii, ke ĉiu kiu proponas prezenton nepre akceptiĝos. Jen tre bedaŭrinda malavantaĝo de la beno havi tiom grandan talentaron! Do anoncu vin laŭeble frue kaj kuraĝe. Simono kaj Alena helpos vin provludi kaj donos helpajn rimarkigojn por polurigi la prezenton.

Hopefully you're excited about our variety show! The program is scheduled for Tuesday evening. It always entertains and delights the whole group, both audience and presenters. So, of course, we depend on the kindness of people courageous enough to lift our spirits with their stage performance. If you have musical talent, something you'd like to recite, dancing skills, or some secret talent that longs for the spotlight, email <adreso forviŝita>

We're such a big group this year that it's going to be an interesting challenge for your organizers to put every talent together in one presentation. The variety show shouldn't be so long that people start to doze off before it's over. And ideally it should be as diverse and colorful as possible. That means we can't guarantee that everyone who applies will necessarily be accepted. That's the unfortunate disadvantage of the blessing of having so large a talent pool! So work up the courage and let us know as soon as possible. Simmon and Alena will help you rehearse and will give you helpful remarks to ensure a polished presentation.



Horizontale

1 Energia ago, cele al io
4 Insekto; problemeto en komputilprogramo
5 Malgranda riverenco
6 Organo, kiu pumpas la sangon
7 Inteligenta mamulo multdenta
10 Unu el la plej dezirataj metaloj
11 Malbela
13 Hartondisto
15 Komparilo Esperanta
16 La boato, kiun uzis Noa
18 Ne povi esti aŭ fari sen
20 Flosema materialo el iu arbo
21 Ofta spico farata el arboŝelo

Vertikale

1 Speco de pika arbo
2 Iu, kiu ne plu laboras
3 Memoriga skribaĵo
4 Granda birdo, kiu laŭfabele portas infanojn al ĝiaj novaj gepatroj
7 Pikilo de planto (aŭ de objekto)
8 Sufikso Esperanta, kiu signifas "pecon de"
9 Ronda, pendanta parto de iu organo
12 Osto, kiu protektas la pulmojn
14 Libro por teni fotojn, desegnojn, notojn
16 Ŝatata, kara homo
17 Angulo de 90 gradoj
19 Stato, kiun oni atingas per meditado

*enigmo de Hanso BECKLIN*

# Helpu Pri Nova Lernolibro

*de Charlotte (Karolino) BURTON*
*(English version follows)*

Dum la lastaj monatoj, mi prilaboris novan lernolibron pri Esperanto. Nun, la malneto aperis, kaj mi bezonas vian helpon. Mi estas instruisto, kaj min ofte konsila aliaj instruistoj, sed nun mi bezonas helpon de lernantoj kaj precipe de komencantoj. Mi petas helpantojn tralegi la malneton kaj respondi la jenajn demandojn: ĉu ĝi helpas vin kompreni; ĉu ĝi kaptas vian intereson; kaj ĉu ĝi donas al vi la helpilojn por trovi la respondojn al viaj demandoj? Se vi interesiĝas pri tio, bonvolu kontaki min (Karolino BURTON) dum la semajno.

In recent months, I have been working on writing a new textbook about Esperanto. Now, the first draft is finished, and I need your help. I am a teacher, and I often hear from other teachers, but now I need help from learners and especially from beginners. I am asking for helpers to read through the draft and answer the following questions: does it help you understand, does it hold your attention, and does it give you the resources to find the answers to your questions? If you are interested, please contact me (Charlotte Burton) during the week.

# La NASKanaro de 2018

*foto de Marcus GRIEP*

